Joachim Ringelnatz,

Genuo-pendo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Mi pendas de turn-stango
kaj kapen fluas la sango.
Se estus mi vesperto,
mi kaptus insektojn kun lerto,
samkiel museto fluganta;
dumtage mi estus pendanta
en iu angulo malhela,
dormante en sonĝo miela.
Ho, mia verto – ve-sperto!
Sentiĝas al mi la inerto!
- Perversa vespera vesperto -
Ne eblas plu!
Tra iu tru‘
malsupre en mia kranio
elfluas jam mia racio.

Traduko de la Germana poemo “Kniehang” de Joachim Ringelnatz *(Hans Bötticher, ∗1883 – †1934) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1983-02.*

MR-034-2 / Arg-584-1177 (2012-05-14 18:39:13)